

LA FILO DE LA HOMO ESTAS TRANSDONITA ... SE IU VOLAS ESTI UNUA LI ESTOS SERVANTO DE ĈIUJ

Komentario al la Evangelio de P. Alberto Maggi OSM

MK. 9, 30- 37

[En tiu tempo] Jesuo kaj siaj disĉiploj trapasis tra Galileo; kaj li deziris, ke neniu tion eksci. Ĉar li instruadis siajn disĉiplojn, kaj diris al ili: La Filo de homo estas transdonita en la manojn de homoj, kaj ili mortigos lin; kaj, mortigite, li leviĝos post tri tagoj. Sed ili ne komprenis la diron, kaj timis demandi lin.

Kaj ili venis al Kapernaumo, kaj kiam li estis en la domo, li demandis ilin: Pri kio vi diskutis sur la vojo? Sed ili silentis, ĉar ili diskutis inter si sur la vojo pri tio, kiu estas la plej granda. Kaj sidiĝinte, li alvokis la dek du, kaj diris al ili: Se iu volas esti unua, li estos lasta el ĉiuj, kaj servanto de ĉiuj.

Kaj preninte infanon, li starigis ĝin meze de ili; kaj ĉirkaŭbrakinte ĝin, li diris al ili: Kiu akceptos unu el tiaj infanoj en mia nomo, tiu akceptas min; kaj kiu akceptas min, tiu akceptas ne min, sed Tiun, kiu sendis min.

Ĉiuj la evangeliaj eroj de la Evangelio laŭ Sankta Marko kiujn ni estas komentariantaj dum tiuj ĉi dimanĉoj ŝajnas havi ion komunan: La malfacilaĵo kiun Jesuo havas kun siaj disĉiploj. Ili tute ne volas kompreni kiu li estas kaj kia estas sia plano.

Ankaŭ ĉifoje ni legas la Evangelion kaj ni vidas ke Jesuo trapasas tra Galileo kaj ke Li estas doninta altvaloran instruon. "La Filo de homo"-Filo de homo estas esprimo kiu celas la homon kiu atingas la plenecon kaj eniras la dian kondiĉon; Jesuo estas la Filo de Dio ĉar li reprezentas Dion en Lia homa kondiĉo, kaj Li estas la Filo de homo ĉar li bildigas la homo en lia dia kondiĉo. Do la Filo de homo estas la homo kiu posedas la dian kondiĉon.

"La Filo de homo estas transdonita en la manojn de homoj". Jen estas kontraŭstaro inter la Filo de homo, kiu havas la plenecon, kaj la

homoj kiuj ne aspiras pri tiu pleneco. Kaj estas tiuj kiuj Lin rifuzas, kiuj mortigos Lin, "sed, mortigite, li leviĝos post tri tagoj".

Do tiu estas grava instruo, drameca instruo, kaj ĝi estas klara instruo. Jesuo ne estas parolanta per paraboloj. Tamen, skribas la evangeliisto, "Ili ne komprenis la diron".

Jam en la rakonto pri la resaniĝo de la surdulo ni rimarkis ke ne temas pri fizikaj malsanoj, sed temas pri problemecaj intimaĵoj – "Neniu estas pli surda ol tiu kiu ne aŭskultas". La nacionalisma ideologio, ilia ideo pri sukceso estas tia ke ĝi malhelpas ilin kompreni la tre klarajn vortojn de Jesuo.

"Sed ili timis demandi lin", ĉar ili timas ke Jesuo konfirmu tiun kiun ili komprenis, do, estas vere, ili ĉion komprenis sed ne akceptis. Do ne estis vero ke ili ne komprenis, ili ne akceptis kion Jesuo diris.

"Ili venis al Kapernaumo. Kiam li estis en la domo" – do en la palestina domo - Jesuo demandis ilin. Ili ne volas demandi Lin kaj estas Jesuo kiu aldemandas ilin, "kaj li demandis ilin: Pri kio vi diskutis sur la vojo?". Jen, tiu indiko "sur la vojo (ἐν τῇ ὁδῷ) estas simptoma, sur la vojo estas la loko de la senfrukta semado, "Sur la vojo oni ĵetas la semon surteren, sed tuj venas la birdoj kaj ĝin rikoltas. Kaj Jesuo klarigante tiujn bildojn diradis ke estas la Satano kiu farigas senutilan la vorton. La bildo pri Satano en tiu Evangelio estas la bildigo de la povo kaj de la sukceso.

"Sed ili silentis". Ili silentas ĉar ili sentas sin kulpaj, ĉar ili scias ke ili faris ion kion Jesuo ne aprobas. "Fakte sur la vojo ili estis diskutintaj"- Jesuo demandis pri kio ili parolis, male ili diskutis, do, temas pri vigla konversacio – pri kiu estas la plej granda inter ili, la plej grava inter ili.

Estas tiu la vermo kiu ronĝas la disciplojn, temas pri la sento de grandeco, la aspiro esti unu la pli grava el ĉiuj aliaj.

“Sidiĝinte”, do Jesuo sidiĝas (κάθισσας) en la pozicio de instruisto, “Li alvokis la dek du”. Estas strange, temas pri domo, pri palestina domo, ĝi ne estas grandega domo, kial Jesuo devas alvoki? La Evangeliisto estus devinta skribi: “Jesuo diris...” kontraŭe Jesuo devas alvoki ilin. Kial? La dek du sekvas Lin sed ne akompanas Lin. Ili ne estas intime proksimaj al Li. Ili nur fizike estas proksimaj al Li, sed ilia pensmaniero malproksimas de Li.

Jesuo estas la Dio kiu pro amo sin metas je la servo de la homoj, Jesuo diris ke la Filo de homo ne venis por esti servita sed por servi la aliulojn, ili kontraŭe pensas nur pri la estrado. Jen kial Li devas alvoki la Dek du, ĉar ili estas malproksimaj de Li..

“Kaj Li diris al ili – ili diskutis pri kiu volas esti la plej granda kaj Jesuo ne akceptas tion, sed Li akceptas ke en la komunumo estu la unua. La unua signifas la plej proksima al Li – “Se iu volas esti unua, li estos lasta el ĉiuj, kaj servanto de ĉiuj”. Do en la komunumo ne ekzistu ideoj pri grandeco kaj graveco, ekzistas neniu homo pli grava aŭ pli granda, sed jes ja ekzistas homoj pli proksimaj al Jesuo. Kiu ili estas? Ili estas tiuj kiuj sin metas je la servo de ĉiuj. Kiu, libere kaj memvole metas sian vivon je la servo de la aliuloj, dum Li devis alvoki la Dek du, “Jesuo, preninte infanon” – tiu estas la individuo kiu estas proksime de Li, oni sin demandas kion faris ĉi tiu infano en tiu domo kun la disĉiploj. La terminon uzita de la Evangeliisto (παιδὸν) indikas ulon kiu pro la aĝo kaj pro la socia pozicio estas la plej malgrava el ĉiuj, ni povus traduki tiun vorton per la termino “helplaboristo”.

Tiu helplaboristo, tiu infano estas la bildo pri la vera sekvanto de Jesuo, pri tiu kiu fariĝis la lasta inter ĉiuj.

“Li metis lin meze de ili”. Meze de ili estas la loko de Jesuo, nu, en la loko de Jesuo la Sinjoro metas tiun ulon kiu sin metas je la servo de la

aliaj. "Cirkaŭbrakinte lin", Jesuo sin identigas kun li, Jesuo sin identigas kun la lasta homo en la socia medio.

"Kaj li diris al ili": Kiu akceptos unu el tiaj infanoj", el tiu helplaboristoj, do ne temas pri iuj ajn infanoj aŭ helplaboristoj, sed temas pri tiuj ĉi, nome tiu estas la bildo pri la disĉiplo kiu vere sin metas je la servo de la aliuloj; "en mia nomo, tiu akceptas min; kaj kiu akceptas min, tiu akceptas ne min, sed Tiun, kiu sendis min".

Jesuo garantias ke kie estas homo kiu pro amo, libere kaj memvole sin metas je la servo de la aliuloj, en tiu homo manifestiĝas la ĉeesto de Jesuo kaj la ĉeesto de Jesuo alportas tiun de Dio mem.

La homo kiu sin metas je la servo de la aliaj estas la ununura sanktejo el kiu elradias la amo de Dio.